

FESTO DE LA PREZENTADO DE JESUO – 2-an de februaro 2014

PER MIAJ OKULOJ MI VIDIS LA SAVANTON – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 2, 22-40

Venis por Maria la tempo de la puriĝo, laŭ la leĝo de Moseo. Tiam la gepatroj portis Jesuon al Jerusalemo, por prezenti Lin al la Sinjoro, ĉar estas skribite en la leĝo de la Sinjoro: „Ĉiu unuenaskita virseksulo apartenas al la Sinjoro“, Ili donis ankaŭ la oferon dekretitan de la leĝo: paron da turtoj aŭ du kolombidojn.

Tiam vivis en Jerusalemo viro, kies nomo estis Simeon, viro justa kaj pia, atendanta kun fido la liberigon de Izraelo. La Sankta Spirito estis kun li kaj rivelis al li, ke li ne mortos antaŭ ol li vidos la Mesion senditan de la Sinjoro. Inspirite de Dio, li iris en la templon, kie li renkontiĝis kun la gepatroj de Jesuo, ĝuste dum ili portis la Infanon por plenumi tion, kion ordonis la leĝo de la Sinjoro. Tiam Simeon akceptis Lin en siajn brakojn kaj dankis al Dio, dirante: „Nun, ho Sinjoro, lasu al via servanto foriri en paco, laŭ via vorto. Per miaj okuloj mi vidis la savon, kiun Vi preparis kaj oferis por ĉiuj popoloj. Li estas la lumo, kiu konatigos Vin al la mondo kaj donos gloron al via popolo Izraelo“.

La patro kaj la patrino de Jesuo miris pro tio, kion Simeon diris pri la Infano. Kaj Simeon benis ilin kaj diris al Maria, patrino de Jesuo: „Jen ĉi tiu estas metita por la falo kaj leviĝo de multaj en Izraelo, kaj por signo de kontraŭdiro. Kaj ankaŭ vian animon trapasos glavo, por ke malkaŝiĝu la pensoj de multaj koroj“.

Tie vivis Anna, profetino, filino de Fanuel el tribo de Aŝer. Ŝi estis maljuna. Post sia virgineco ŝi vivis sep jarojn kun sia edzo kaj poste vidviniĝis. Nun ŝi atingis okdek kvar jarojn. Ŝi neniam foriris de la templo, servante al Dio nokte kaj tage per fastoj kaj preĝoj. Ankaŭ ŝi alvenis ĝuste en la sama horo kaj laŭdis Dion, parolante pri la Infano al ĉiuj, kiuj atendadis la liberigon de Jerusalemo. Kiam la gepatroj de Jesuo plenumis ĉion, laŭ la leĝo de la Sinjoro, ili reiris

kun Jesuo en Galileon, al sia urbo Nazaret. Dume la Infano kreskis kaj fortiĝis pleniĝante de saĝeco, kaj la graco de Dio estis sur Li.

Malgraŭ la eksterordinara sperto kiun la gepatroj de Jesuo havis, aparte lia patrino, ili estas ankoraŭ ankritaj al la tradicio de la popolo, kiu vidas la rilaton kun Dio bazita sur la observo, sur la obo al lia leĝo.

La evangeliisto en tiu ĉi peco volas antaŭi kaj bildigi la malfacilaĵon kiujn spertos Jesuo proponante al sia popolo malsaman rilaton kun Dio, ne plu bazitan sur la obo al liaj leĝoj, sed sur la akcepto de lia spirito, de lia amo.

Jen do ke la evangeliisto, en la epizodo konata kiel la prezentado de Jesuo al la templo, prezentas du kontraŭajn grupojn. Unu reprezentata per la gepatroj de Jesuo kiuj portas la bebon por plenumi senutilan riton, ĉar ili intencas igi filo de Abrahamo tiun kiu jam estas kontraŭe filo de Dio. Aliflanke estas la homo de la Spirito, Simeon, celanta malebligi la senutilan riton.

La gepatroj iras por la puriĝo de la patrino – ĉar la nasko de infano igis la patrinon malpura kaj do la virino devis puriĝi per ofero, kaj ĉi tie temas pri la ofero de la pli malriĉaj, paro da turtoj – kaj precipe por pagi la elaĉeton de la filo.

Ĉiun unuenaskita virseksulo kiu naskiĝis, fakte, apartenis al la Sinjoro. Se la gepatroj lin volis ili devis al li pagi la samvaloron de dudek labortagoj, tio estas kvin siklojn. La evangeliisto, dum Maria kaj Jozefo iras kun la bebo al la templo por plenumi tiun ĉi riton, prezentas al ni surprize – la evangeliisto utiligas esprimon kiu indikas miron – “*Tiam vivis en Jerusalemo viro, kies nomo estis Simeon*”. Simeon signifas “La Sinjoro estas aŭskultata”, li estas la homo de la Spirito, kiu klopodas malebligi la senutilan riton.

Fakte Simeon prenas la infanon en siajn brakojn, dum la gepatroj volas plenumi ĉiun priskribon de la leĝo, kaj eldiras profetaĵon kiu konsternas la gepatrojn. Fakte ili diras pri Jesuo ke li estos *gloro de sia*

popolo, Izraelo, kaj tion Maria kaj Jozefo sciis, tio estis la tasko de la Mesio, de la Filo de Dio, sed, kiel novaĵo, lumo por vin konigi al la gentoj, tio estas al la paganaj popoloj. La amo de Dio, anoncas Simeon, estas universala, ĝi ne plu estas nur por la elektita popolo, sed por la tuta homaro.

Pro tio la malamikoj de Izraelo, tio estas la paganoj, ne plu devos esti regataj kiel ili kredis, kiel la tradicio prezentis, sed akceptataj kiel fratoj. Poste Simeon donas al Maria benon, kiu finiĝas iom malbonaŭgure. Jesuo estas bildigita per tio kion Luko pli poste en sia evangelio prezentos kiel "ŝtono", ŝtono kiu povas esti bazangula, utiligata por konstruado, aŭ ŝtono kiu stumbligas personojn, ilin frakasas, kaj fakte li diros pri Jesuo "*Jen ĉi tiu estas metita por la falo kaj leviĝo de multaj en Izraelo*".

Kaj, kiel signo de kontraŭdiro *ankaŭ al vi*, nome li sin adresas al Maria, la patrino de Jesuo, *vian animon trapasos glavo*, tio estas via vivo. Kiu estas la signifo de tiu glavo kiu trapasas la tutan vivon de Maria? La glavo, kaj en la Malnova kaj en la Nova Testamento, bildigas la vorton de Dio, kiu estas efika samkiel glavo, tiel diros la verkinto de la letero al la Hebreoj, *la vorto de Dio estas kiel glavo kiu atingas eĉ la artikojn kaj la medolon kaj la dividpunkton de la animo disde la Spirito*.

Simeon do al Maria, kiu reprezentas la popolon de Izraelo, anoncas ke la vorto de tiu filo estos por ŝi kiel glavo kiu ŝin devigos fari elektojn, foje eĉ tre dolorigajn. Fakte, en la posta epizodo kiun la evangeliisto prezentos, tiu de la retrovo de Jesuo en la templo, li verkos tiel ke la unuaj kaj ununuraj vortoj kiujn Jesuo adresos al sia patrino estos riproĉovortoj.

Ankoraŭ longas la irado de Maria. Maria devos kompreni ke de patrino de la filo ŝi devos transformiĝi en disĉiplon. Longa kaj doloriga irado, kiel glavo kiu trapasas la animon.